

PALMODIMANÇO – 20-a de marto 2016

BENATA KIU VENAS EN LA NOMO DE LA ETERNULO – komento al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Luko 19,28-40

Kaj tion dirinte, Li ekiris antaŭe, suprenirante al Jerusalemo. Kaj kiam Li alproksimiĝis al Betfage kaj Betania, apud la monto nomata Olivarba, li sendis du el siaj disĉiploj, dirante: "Iru en la kontraŭan vilaĝon, en kiu, enirante, vi trovos azenidon ligitan, sur kiu neniu homo iam ankoraŭ sidis; ĝin malligu kaj alkonduku. Kaj se iu demandos al vi: Kial vi ĝin malligas? parolu jene: La Sinjoro ĝin bezonas. Kaj la senditoj foriris, kaj trovis, ĝuste kiel Li diris al ili. Kaj dum ili malligis la azenidon, ĝiaj posedantoj diris al ili: Kial vi malligas la azenidon? Kaj ili diris: La Sinjoro ĝin bezonas. Kaj ili alkondukis ĝin al Jesuo; kaj ĵetinte siajn vestojn sur la azenidon, ili sidigis Jesuon sur ĝin. Kaj dum Li iris, ili sternis siajn vestojn sur la vojo. Kaj kiam Li jam alproksimiĝis, malsuprenirante la deklivon de la monto Olivarba, la tuta amaso de la disĉiploj komencis ĝoji kaj laŭdi Dion per laŭta voĉo pro ĉiuj potencaĵoj, kiujn ili vidis; dirante:

**Estu benata la Reĝo, kiu venas
en la nomo de la Eternulo;
paco en la ĉielo
kaj gloro en la supera alto.**

Kaj iuj Fariseoj el la homamaso diris al li: "Majstro, admonu viajn disĉiplojn".

Kaj responde Li diris: "Mi diras al vi, ke se ĉi tiuj silentos, la ŝtonoj ekkrios."

En la Palmodimanĉo la liturgio prezentas la eniron de Jesuo en Jerusalemon laŭ Luko. Por kompreni ĝian signifon, ni relegu la profetaĵon el la libro de profeto Zakario *"Montru vian ĝojon, filino de Ciono! (Ciono estas Jerusalemo, kaj ĝi simbolas la tutan popolon) Jubilu, filino de Jerusalemo! Jen, al vi venas via reĝo."* Li estas justa kaj venka,..." (Zak 9,9).

Tiu estis la la atendo de la reĝo, de la mesio, de la liberigonto de Izraelo. Sed la daŭrigo de Zakario estas ŝoka: *"...humila, li rajdas azenon, azenidon, idon de azenino"*. La kutima rajdobesto de reĝo estis mulo aŭ ĉevalo. Neniam oni vidis reĝon sur azenido. La profeto volas montri, ke oni povas esti mesio en maniero malsama de tiu atendita. Do la mesio povas esti modesta, humila, kaj rajdi la rajdobeston de la popolo; kaj ne nur: *"...li forigos la militĉarojn de Efraimo kaj la ĉevalojn de Jerusalemo. La milita pafarko estos rompita, li anoncos pacon al la popoloj"* (Zak 9, 10).

Tiel profetis Zakario. Sed tiu profetaĵo estis lasita flanke, kvazaŭ forgesita. La atendata mesio estis ido de Davido, do iu, kiu, simile al la granda reĝo kuniginta la Izraelajn tribojn per povo, potenco kaj superforto, restarigu la malaperintan reĝlandon Izraelo.

Ni sekvu nun la interpreton de Luko.

"Kaj tion dirinte,..." En la antaŭa ĉapitro (Lk 19, 12-27) Jesuo rakontis la parabolon pri la minoj, konata ankaŭ kiel la parabolo pri la talantoj; en ĝi rolas grupo da personoj, kiuj ne deziras, ke iu ulu iĝu ilia reĝo. Do estas iu rifuzo de la reĝeco, kaj tio anticipas, ke la popolo rifuzos Jesuon kiel reĝon.

"...Li ekiris antaŭe, suprenirante al Jerusalemo". Tiu estas la lasta etapo de Lia vojaĝo. *"Kaj kiam Li alproksimiĝis al Betfage kaj Betania,..."*. Ĉiuj evangeliistoj, aludante al la morto de Jesuo, memorigas ankaŭ Lian resurekton. Jerusalemo estas la urbo, kie Li estos murdita, Betania estos la loko de la resurekto kaj ĉieliro de Jesuo.

„...apud la monto nomata Olivarba, li sendis du el siaj disĉiploj, dirante: 'Iru en la kontraŭan vilaĝon', vilaĝo en la evangelioj estas rigardata malfavore: ĝi estas la loko de la tradicio, kie pri la novaj ideoj oni suspektas, loko ligita al la pasinteco kaj rifuzanta ĉion novan ,...en kiu, enirante, vi trovos azenidon ligitan, sur kiu neniu homo iam ankoraŭ sidis; ĝin malligu ...". Estas grava ĉi tiu verbo: en ĉi tiu teksto ĝi aperas kvar-foje. Kiun signifon Luko volas doni al vorto, kiu aspektas nelogika? Kion ili malligu? Ĝuste tiun profetaĵon, kiu estis iel katenita, ligita, ĉar oni ne volis mesion modestan kaj pacan. Tion ili malligu. Sed unuavice pri tio konvinkiĝu la disĉiploj mem. *"... kaj alkonduku"*.

"Kaj se iu demandas al vi: 'Kial vi ĝin malligas?' parolu jene: 'La Sinjoro ĝin bezonas'. Kaj la senditoj foriris, kaj trovis, ĝuste kiel Li diris al

ili". Tiu interparolo aspektas absurda, nelogika. Tiuj nekonatoj alvenas kaj malligas la azenidon,. Daŭrigas Luko "Kaj dum ili malligis la azenidon, ĝiaj posedantoj diris al ili: 'Kial vi malligas la azenidon?' Kaj ili diris: 'La Sinjoro ĝin bezonas'". Ŝajnus, ke la posedantoj respondas: "Ja bone!". Estas io nerealeca en tio. Sed Luko per ĉi tiu nelogika rakonto volas komprenigi tion: Jesuo malligas tiun profetaĵon, kiu restis ligita, ĉar al neniu interesas reĝo tia.

Kaj dum la mastroj (la posedantoj) ligas, Jesuo, la Sinjoro, estas la malliganto.

"Kaj ili alkondukis ĝin al Jesuo; kaj ĵetinte siajn vestojn sur la azenidon, ili sidigis Jesuon sur ĝin". La vestoj, en la juda simbolaro, reprezentis la personon, la econ de la persono. Do nun la disĉiploj akceptas tiun pacan mesion, kaj Lin metas sur la azenidon, rajdilon de paco. "Kaj dum Li iris, ili sternis siajn vestojn sur la vojo". Aliaj ne komprenas la unuan geston, kaj ripetas la solenan kronadon de la reĝo, kiam la popolo sternis la vestojn (kiel ni diris, la vestoj simbolas la personon) sur la vojono, kaj la reĝo ilin tretis, rajdante aŭ marŝante, kaj tio signifis submetiĝon.

Do la teksto estas dusenca, kaj aludas la tragikan finon de Jesuo forlasota. Kiam la popolo, la sama Lin hodiaŭ aklamanta, rimarkos, ke Li ne estas la reĝo, la mesio, la liberiganto, la triumfanto per forto, krios poste: "Krucumu!". Kaj kiam Li jam alproksimiĝis, malsuprenirante la deklivon de la monto Olivarba, la tuta amaso de la disĉiploj komencis ĝoji kaj laŭdi Dion per laŭta voĉo pro ĉiuj potencaĵoj, kiujn ili vidis"; kantante la psalmon por la surtronigo de la mesio" (Ps 118,26):

'Estu benata la Reĝo, kiu venas en la nomo de la Eternulo'

kaj la anoncon de la anĝeloj al la paŝtistoj ĉe Kristnasko (Lk 2,14)

"Paco en la ĉielo kaj gloro en la supera alto.

Jesuo estas mesio paca, mesio donaco de Dio. Al tiu aklamado de la disĉiploj reagis furioze la fariseoj. "Kaj iuj Fariseoj el la homamaso diris al li: "Majstro, admonu viajn disĉiplojn". La verbon "admoni" oni uzis por la demonoj kaj por la demonuloj. Laŭ la fariseoj la disĉiplojn posedas ideologio demona, ĉar ili aklamas mesion pacan, kiun la fariseoj ne akceptas.

Kaj responde Li diris: "Mi diras al vi, ke se ĉi tiuj silentos, la ŝtonoj ekkrios."

Ankaŭ ci tiu estis konata profetaĵo el Ĥabakuko kontraŭ maljustaĵoj: "La ŝtono krios de la muro" (Ĥabak 2,11). Maljustaĵo estos la morto de la liberiga mesio.

